WIKIPEDIA

Astura lingvo

La **astura lingvo** (asture *asturianu* [asturjanu]) estas latinida lingvo, parolata en la nordhispania regiono de Asturio (asture *Asturies*, hispane *Asturias*).

Multaj asturoj glitas en kontinuo inter la norma hispana kaj la astura laŭ la medio. En la okcidenta parto de Asturio oni parolas la galegan lingvon.

Tamen, nuntempe la lingvo suferas multe pro malprestiĝo kaj politika depremo. Kvankam ĝin parolas entute efektive 450 000 homoj, laŭ nombrado de 1991 fare de la hispana registaro, nur en Miranda de Douro ĝi estas nun oficiale agnoskata lingvo. La leĝo pri aŭtonomeco de Asturio apenaŭ agnoskas ĝin protektinda. Aliloke oni eĉ ne agnoskas ke ĝi estas vera lingvo, sed insistas, ke ĝi estas nura dialekto de la hispana lingvo. Alia nomo por la lingvo estas *bable*, kiun memkonsciaj parolantoj de la astura malŝategas. Ĝi estas parenca al "babili". La uzo de tiu termino montras, ke eĉ la kritikuloj sentas la fortan *malsamecon* inter la astura kaj la hispana, kaj tiel montras falsa ilian pretendon ke ĝi estas nura dialekto de la hispana.

Estas tri grupoj de dialektoj: okcidenta, centra kaj orienta astura lingvo. Ekzistas ankaŭ Akademio (*Academia de la Llingua Asturiana*), kiu laboras pri komuna lingvo.

Ekzempla frazo: *Munches Gracies = Grandan Dankon*; *Güei voi dir al monte = Hodiaŭ mi iros al la monto*

La unua filmo de fikcio realigata en la lingvo, en 2011 estis *A fiya del xastre*.

Eksteraj ligiloj

- Asturia–angla vortaro (http://www.websters-online-dictionary.org/definition/Asturian-english)
- Spaco kaj tempo de la asturia lingvo (http://www.asturies.com/asturianu/)
- Academia de la Llingua Asturiana (http://www.academiadelallingua.com/) „Akademio de la Astura Lingvo“, asture.

Astura

Asturianu (asturjanu)

Parolata en	Asturio
Parolantoj	110 000
Fremdlingvo / dua lingvo por	450 000
Skribo	latina
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Italika	
Latinida lingvaro	
Ibero-latinida lingvaro	
Oficiala statuso	
Reguligita de	Akademio de la Astura Lingvo
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	sen valoro
ISO 639-2	ast
ISO 639-3	ast
Glottolog	astu1246
Angla nomo	Asturian

- Asturlingva fako (http://dmoz.org/World/Babl e/) de DMoz

Franca nomo	asturien
Vikipedio	

Vidu ankaŭ

- Akademio de la Astura Lingvo
- Lingvistiko
- Listo de lingvoj

mapo pri la lingvoj parolataj sur la Ibera duoninsulo: la astura bildigita helverde

Asturileonaj lingvoj

Asturia lingvo • Leona lingvo • Ekstremadura lingvo • Kantabra lingvo • Miranda lingvo

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Astura_lingvo&oldid=6400107"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:15, 25 sep. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.